

Oni tuj komencis ĉirkaŭkuri en ĉiu direkto, kaj pro la klopodoj ĉeiĝi, faligis sin reciproke. Tamen en la fino (post kelke da minutoj) ĉiuj trovis la proprajn lokojn, kaj la ludo komenciĝis. Neniam en la tuta vivo Alicio vidis tian strangan krocketludejon. Ĉie sur la grundo alterniĝis paralelaj ondlinioj; anstataŭ lignopilkoj oni uzis erinacojn; por frapi ilin, anstataŭ la ordinara lignomartelaĵo, oni havis vivantan fenikopteron; kaj la arkojn oni anstataŭis per soldatoj, kiuj devis kurbigi sin kaj staradi senmove sur la manoj kaj piedoj egale.

Por Alicio la ĉefa malfacilo estis la malfacilo elregi la fenikopteron. Prosperis al ŝi komforte formeti la korpon sub sia brako kun la kruroj pendantaj post ŝi. Sed plej ofte kiam ŝi jam bone rektigis la kolon, kaj estis preta frapi per ĝia kapo la erinacon, ĝi persistis ĉirkaŭtordi sin kaj rigardi en ŝian vizaĝon kun ridinde konfuzita mieno. Ĉe ĉiu revido de tiu konfuzita birdvizaĝo ŝi ne povis ne ekridegi; ankaŭ, kiam ŝi sukcesis malsuprenigi la kapon, kaj denove volis fari la frapon, jen la erinaco, malvolvinte sin dum ŝi penis mastrumi la birdon, jam rampas for. Krom ĉio ĉi, en la direkto kien ŝi volas frapsendi la erinacon, plej ofte malhelpis la tre onda grundsurfaco; kaj fine la arkoj ofte rektigis sin kaj marŝis for por alparoli aliajn arkojn. Alicio baldaŭ konvinkiĝis ke la krocket-

KROKETLUDO ĈE LA KELO

ludo, kiel oni ludas ĝin ĉe la Kelo, tre malfacila.

La partoprenantoj, ne atencante, ludis ĉiuj samtempe. Oni ĉiam kies estas la diversaj erinacoj kaj eĉ batalis por posedi ilin. Ĉu tempo, la Damo tute furioziĝis, gante kaj kriegante ĉiuminute, lin, oni senkapigu ŝin!"

Tio estis por Alicio tre malfacila. Estas vero, ke ĝis nun ŝi ne ludis kun la Damo, sed ŝi tre bone povas okazi, "kaj se mi ofendiĝas, ŝi "kio okazos al mi? Tio ĉi ordonas senkapigojn, ke mirinde unu individuo restas vivanta."

"Ŝi ĉirkaŭrigardis, serĉante forkuri," kaj dubante ĉu ŝi povis nerimarkite. Dum tiu ĉirkaŭrigado rimarkis strangan aperon en la tereno, ŝi ne povis imagi kio ĝi signifis servinte ĝin kelke da momentoj, ke ĝi estas grimaco. "Do, venas" ŝi konkludis, "nun mi iras al lanton."

"Ĉu vi bone progresas en la ludo? Kato, kiam aperis nur la buŝo, parolilaro. Tuj kiam aperis la ludo, amike salutis. "Sed ne utila